

Detlev von Liliencron,

Amkanto

tradukita de Manfredo Ratislavo

Forlasite mi ĉagrenas,
 En soleco sidas mi.
 Ĉiujn homojn abomenas
 Mi, min mem ne plu komprenas;
 Venu, dolĉulin' al mi.

Verdaj branĉoj, ĉiu floro
 Min klinigas ja al vi,
 Ardas mi pro am-fervoro,
 Brulas por vi mia koro,
 Venu, dolĉulin' al mi.

Estas daŭre mi pensanta
 Nur pri vi, ho karulin':
 Ĉasta amo baraktanta ²
 Kontraŭ am-avid' konstanta –
 Dolĉulin', kompatu min!

*Traduko de la Germana poemo "Liebeslied" de DETLEV VON LILIENCRON (*1844-06-03 – †1909-07-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2005-05-08.*

MR-458-1 / Arg-414-821 (2007-05-10 10:10:56)

La germana-lingvan originalon de tiu ĉi poemo mi, Manfred Retzlaff, trovis en la retejo www.creative-edesign.com/nordseeinsl_pellworm/pellworm_liliencron_vor_tagesanbruch.php.

²aŭ: Ĉasta amo luktadanta
 aŭ: Ĉasta am' en mi luktanta